

Ora Ĵurnalo

Numero 35, Decembro 2020



La muzea bieno "Lilla Änggården"

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2	Vintra kanto	19
Espeporko meditas.....	3	Dana kristnaska kanto.....	20
Invito al libro-rondo, kiu komenciĝos fine de januaro en 2021!.....	4	La hundo Linus	21
Invito al tri kursoj en la pola universitato Jagelona.....	4	Buteo.....	21
Sur la unua paĝo – Lilla Änggården – oazo en Gotenburgo	5	Unu el la Svedaj historiaj stiloj.....	23
Stelo kun verdaj gutetoj, farita de Siw Bank..	6	Hanna Lindmark, la fondinto de la Margareta-lernejo.....	25
La Turka Stelo.....	7	Vino ĉe la kristnaska tablo kun jula manĝo de Ingrid Vallin	28
El Pollando Elwira Twardowska sendis	7	Klokbok – Saĝa libro.....	30
Montrofenestro en Japanio en novembro.....	8	J.K. Rowling	31
Origamaĵoj en Partille	9	Defendo de la sveda lingvo – Språkförsvaret.....	33
La pola radio parolas pri du retaj gazetoj, el kiuj unu estas ORA ĴURNALO	9	La mondvasta meblo-entrepreno IKEA lanĉas novajn bazajn lingvajn principojn	36
Eble konsolo en koronatempoj	11	Ĉiun dimanĉon Språkförsvaret havas novan poemon.....	37
Kobolda ĥoro en korona distanco.....	12	Sten Svenonius argumentas	37
La tago de la Infankonvencio 20 novembro.	12	Konstrui sunfornon de Carl-Olof Selenius ...	39
La Nobel-premio ekzistas dank’ al ĉevaloj ...	13	Jerker Johansson, konatulo en la muzika mondo de Gotenburgo	41
Komunikiloj tiam kaj nun	14	Jarmila Rýznarová forpasis	45
Kristnasko dum mia infanaĝo, Lenke Szász..	15	Je la fino de 2020	46
Jula rakonteto el la pasintaj tempoj en postmilita lando – en Finnlando, Raita Pyhälä.....	16		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj

Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com.

Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





Espeporko meditas



- ☆ Fakte la amarilido sur la bildo samtempe havas 10 florojn sur du tigoj de unu bulbo. Tria tigo estas survoje. Kio estas la plej multaj floroj de amarilido, kiun vi iam vidis?
- ☆ Mi vere ĝojas ke La Pola Radio parolis pri Ora Ĵurnalo la 27an de novembro!
- ☆ Jen ja kristnaska numero. La unua kontribuo pri infana kristnasko venis de Lenke el Rumanio. Tie anĝeloj disdonis kristnaskajn donacojn. La dua kontribuo venis de Finnlando. Rajta rakontas pri Joulupukki, kiu tie distribuis la paketojn.
- ☆ Muziko apartenas al Kristnasko. Mi ŝatas grandajn ĥorojn, anglajn kristnaskajn kanzonojn kaj blovmuzikon. Pri la lasta, Jerker Johansson, konatulo en la gotenbarga muzikmondo, rakontas. Ingegerd intervjuas. Ŝi metis Jerker en "la fajran seĝon" (sveda esprimo).
- ☆ Ĉu kelkaj personoj povas antaŭvidi la estontecon? En 1984 Sylvia Browne avertis ke venos pandemio en 2020 – sed laŭ ŝi ĝi malaperos same rapide kiel ĝi alvenis.
- ☆ Al gazeto sen rakontoj pri bestoj mankas iu esenca. Do, ĉi tie troviĝas birdo, hundo kaj ĉevaloj. Sen la ĉevaloj de Alfred Nobel, la Nobel-premio ne ekzistus, laŭ loka gazeto.
- ☆ Debato pri la angla lingva invado en la svedan kaj la argumentoj por esperanto en la tuta mondo – pri tio vi povos legi!
- ☆ Carl-Olof Selenius scias konstrui sunfornon. Imagu: dum la venonta somera kurso ni povos pikniki kaj kuiri en la naturo.
- ☆ Ĉu vi intencas legi iun Harry Potter-libron kune kun gefiloj aŭ genepoj dum Kristnasko? Se jes – unue legu tekston pri la verkistino J.K. Rowling, skribita de Monica.
- ☆ Biero aŭ vino kun kristnaskaj pladoj – Ingrid donas konsilojn.
- ☆ Ĉu vi memoras Carin Bruce, kiu instruis nin pri komunikado laŭ LärOlika? Nun ŝi prezentas "Klokbok" (Saĝa Libro) kunlaborante kun UNESCO.
- ☆ Parolinte pri "Saĝa libro"... certe post legado de libro ni estos pli saĝaj, pli sentemaj, pli bonaj esperantoparolantoj. Kaptu la eblecon trejni per partopreno en la libro-rondo, inicita de Ingegerd. Inga jam legis "Sesdek ok" de Sten Johansson kaj resumas tiele: "persona raporto pri kio okazis 1967 ĝis 1968". Jes – certe bona elekto.
- ☆ **Finfine: Koran dankon pro ĉio, kion vi faris favore al Ora Ĵurnalo dum 2020!**

/Siv



Invito al libro-rondo, kiu komenciĝos fine de januaro en 2021!



La Gotenburga klubo invitas vin al librorondo kun reta kunveno unu dimanĉon monate je la 17a horo!

Estas la plej bona maniero regule lerni kaj diskuti esperante!

Krome vi estos al kutimigita al retaj komunikiloj. Vi povas sidi sola en via hejmo, aŭ ie kune kun alia partoprenanto.

Ni legos *Sesdek ok* – la plej nova libro de Sten Johansson.

Ni interkonsentu pri la legenda nombro da paĝoj antaŭ ĉiu renkontiĝo.

Ni provos helpi vin pri la tekniko. (Ni uzos la grupkomunikilon Jitsi, kiu estas tre simpla. Per retpoŝto ni sendas ligilon al la partoprenantoj, kaj vi nur devas englui ĝin en via retumilo – prefere en Chrome.)

Ne hezitu! Sendu retleteron al mi kaj mi revenos kun pliaj informoj, kiam kelkaj personoj aliĝis.

Bonvenon al la nova tempo!

Ingegerd

ingegerd.granat@telia.com



Sten Johansson: Sesdek ok

Originala romano en Esperanto

ISBN 9781595694126

186 paĝoj. Mole bindita libro. 21,5 cm × 14 cm.

Priskribo: La jaro 1968 estis eventoriĉa jaro, plurloke en la mondo: En Usono pliaktiviĝis la fortoj kontraŭ la milito de la usona registaro en Vjetnamio, kaj en Ĉeĥoslovakio la t.n.

Praga Printempo unue ekfloris kaj poste en la sama jaro estis disbatita de la armeoj de la Varsovia Pakto. La romano mencias ambaŭ okazaĵojn, sed koncentriĝas sur tria tumulto evento: la ribeloj de la studentoj en Parizo.

Ĝi troviĝas kiel **ebook** en la formato *epub*.

Kostas: \$ 6.95 USD, ĉirkaŭ **80 SEK**.

Invito al tri kursoj en la pola universitato Jagelona

Eble povus plibeligi viajn tagojn regula renkontiĝado kun afablaj gesamideanoj, dum lernado. La fama Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando, proponas al esperantistoj de la tuta mondo tri diversajn kursojn.

kurso 1

Kuraĝe korektu viajn lingvajn erarojn.

Estas iom hontige fari tro multajn erarojn... Agrable kaj kuraĝe korektu ĉiajn malperfektaĵojn en via lingvouzo, sub gvido de instruistino. Vi ricevos multe da helpo pri la individua uzado de la lingvo.

kurso 2

Kurso por verkemuloj. Ripeto de la sukcesa kurso el la pasinta jaro por verkantoj de

diversaj tekstoj. La skribaj aktivaĵoj ampleksos leksikon, gramatikon, donos specialan atenton al sintakso kaj zorgado pri stilo. La programo respektos la individuan stilon de la partoprenantoj, okazos laboro pri ties disvolvado, krome, lernado per la stilo de modelaj verkintoj de la Esperanto-literaturo.

kurso 3

Kompreni la lingvaĵon de aŭtoroj de esperantaj beletraj verkoj kaj lerni la lingvon per literaturo.

Kurso por kiu? Por ŝatantoj de literaturo, por legemaj personoj, fakuloj pri beletro, esploristoj (vidi unikan, aŭtoran metodon).

La partoprenantoj enprofundiĝos en tekstojn por vidi, kion la aŭtoroj reale diras (ne "volis diri", kiel oni ofte diras en lernejoj), kiel ili esprimas ideojn, emociojn ktp. per vortoj. Oni esploros la fundon de la tekstoj. La lernado multe pliriĉigos la komprenon de beletro kaj influos la kapablon de la partoprenanto verki.

Temas pri 5-monataj kursoj (ekde la komenco de januaro 2021), kun lecionoj okazantaj unufoje semajne.


La oficialaj konfirmiloj pri la partopreno enhavas krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, la markon de la prestiĝa, internacia EAQUALS-kvalito de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon.

Limdato por aliĝi: 20 decembro 2020 (**eblas ankaŭ poste, laŭ disponeblaj lokoj**).

Pli da informoj pri la kursoj:

<https://bit.ly/37MIYye>

Se, studinte ĉiujn informojn en la ĉi-supre indikita retpaĝo, vi decidis **aliĝi**, bv. skribi al: [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(ĉe\)gmail.com](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(ĉe)gmail.com) (ni publikigas la adreson de la kursoj en tia kontraŭ-spama formo).



Invitas vin kore

Maria Majerczak

Gvidantino de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato

Sur la unua paĝo – Lilla Änggården – oazo en Gotenburgo



Jam en la 17a jarcento Änggården troviĝas en la historiaj dokumentoj. La kalkulraportoj de la reĝaj voktoj raportas ke "Arfued djureskyttere" loĝis tie. Li estis arbargardisto kaj bestpafisto en Slottsskogen (la reĝa arbaro). Fine de la 18 jarcento oni dividis Änggården en du partojn: La Granda Änggården, kiu troviĝas en la Botanika ĝardeno kaj la malgranda Änggården apud la montoj.



Lilla Änggården estas unu el la malmultaj konservitaj parence hereditaj bienoj en Gotenburgo. Ĝi devenas de la 18a jarcento, kaj en la domo troviĝas mebloj kaj objektoj el tri jarcentoj.

Unue Lilla Änggården estis la somerdomo de la apotekisto Grén, sed en la 1940-aj jaroj liaj nepoj Carl kaj Sven Grén Broberg decidis daŭre loĝi tie.

La familio Grén aĉetis ambaŭ bienojn kaj evoluigis elstaran terkulturan posedaĵon. Ilia intereso pri ĝardenkulturo estis granda... Sur la senarabaj montoj de Änggården ili plantis arbojn. Fine de la 19a jarcento oni vendis Änggården al la urbo kaj la Sahlgrenska malsanulejo estis konstruita sur la supera altaĵo.

La Botanika Ĝardeno malfermis la pordegojn en 1919.

Hodiaŭ Lilla Änggården estas muzeo, fermita pro la pandemio... sed poste ni povos ĝui la etoson de la malnova bieno. /Siv

Stelo kun verdaj gutetoj, farita de Siw Bank



*Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.*



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Decembro 2020 n-ro: 60



La Turka Stelo nun prezentas sian 60:an numeron, kio signifas ke la gazeto celebras sian kvinjaran ekzistadon.

Gratulon! diras Ora Ĵurnalo (nur trijara).

La redaktoron Vasil Kadifeli vi povas trovi per:
vasilkadifeli(ĉe)gmail.com.
Li bonvenigas kontribuojn el multaj landoj.

Ĉiun monaton la retgazeto havas 32 plenplenajn paĝojn de interesa legado. /Siv

El Pollando Elwira Twardowska sendis:

Mi feliĉe hieraŭ finis mian laboron. Ni produktis kelkajn mallongajn filmetojn kiujn eblos vidi per komputilo anstataŭ persone partopreni decembrajn eventojn en la urbo.

Bildoj el Gdansko





Montrofenestro en Japanio en novembro

Ett skyltfönster i Japan i november



Trovita de Inga Johansson. La Gotenburga klubo volus tian montrofenestron en la centro de Gotenburgo. Ni serĉu! /Siv

Origamaĵoj en Partille



Ekster la biblioteko de Partille en montrofenestro troviĝis dum du semajnoj origamaĵoj faritaj de Inga Johansson.

/Siv

La pola radio parolas pri du retaj gazetoj, el kiuj unu estas ORA ĴURNALO

Inga Johansson trovis la elsendon en pola-retradio.org:



Enretigita de Barbara Pietrzak en 27 novembro 2020.

La programo komenciĝas per raporto pri artekspozicioj kaj artkonkursoj dise en la mondo kun aŭ sen partopreno de UEA. Dum la tuta programo estas agraba muziko.

Sekvas raporto pri la retgazeto **"Esperanto en Azio kaj Ozeano"**.

Tiu retgazeto vere raportas pri vasta regiono. Mi enmetas la programon por 2020 (*okazita – aŭ*

haltigita pro la pandemio – mi ne scias). Miru pro la geografia vasto!

Esperantaj aranĝoj en Azio kaj Oceanio, 2020

lando kongreso/aranĝo de ~ ĝis urbo

Nov-Zelando Aŭstralio/Nov-Zelanda Kongreso 01–10 ~ 19 Aŭklando

Tajvano Komuna staĝo de Koreaj kaj Tajvanaj E-istoj 02–06 ~ 09 Pingtung

Nepalo Speciala Ekskurso 2020 en Nepalo (4-a) 02–26 ~ 03–08 Katmanduo
retadreso: nesp.a.1990(a)gmail.com

Israelo Israela Kongreso (21-a) 04–02 ~ 05 Tel-Avivo
retejo: <http://esperanto.org.il/ik.html>

Irano Irana E-Kongreso, IREK-7 (7-a) 04–16 ~ 04–18 Teherano
retejo: <https://www.espero.ir/eo/irek-7/>
retadreso: info(a)espero.ir

Filipino Filipina Junulara Kongreso de E (1-a) 04–23 ~ 04–26 Manilo
retejo: <https://fjk.up-esperas.org/#!>
retadreso: peyc2020(a)gmail.com.

Taĝikio Mez-Azia Kunveno (1-a) 05–01 ~ 09 Duŝanbeo retejo:
https://uea.org/vikio/Unua_Mez-Azia_Kunveno
retadreso: mezaziakunveno(a)gmail.com

Koreio Internacia E-Renkontiĝo de Meditado (16-a) 05–02 ~ 05 Gangnung retejo:
<https://www.youtube.com/watch?v=i2LSA5pRxiU>
retadreso: chtaesok(a)hanmail.net

Irano kaj Israelo en la sama kunveno – mirige!!!!

Barbara Pietrzak diras: En nia hodiaŭa E-elsendo ni proponas *Trarigardon de la E-Gazetaro*, ĉifoje koncentriĝante pri du elektronikaj periodaĵoj: la 109a, novembro numero de la bulteno **"Esperanto en Azio kaj**

Oceanio" kaj la 34a, novembro numero **"Ora Ĵurnalo"** de la Esocieto de Gotenburgo.



Bildo el la magazino "Esperanto en Azio kaj Oceanio".

Pri Ora Ĵurnalo:

Barbara Pietrzak citas la vortojn de la unua paĝo: "Magazino por kulturo kaj plezuro" eldonita de la Esperanto-Societo de Gotenburgo.

Inga Johansson atentigis ŝin pri Ora Ĵurnalo – jam pri la oktobra numero, sed kiam la novembro numero aperis, ŝi elektis ĝin. Radiaj elsendoj ja strebas esti aktualaj. Ŝi konstatis ke ni ofte prezentas gotenburgajn konstruaĵojn kaj ĉi tiun fojon ni ankaŭ raportis pri la urba fondinto Gustav II Adolfo, kies bildo troviĝis sur tortetoj manĝataj honore al lia mortotago, la 6an de novembro en 1632. Populara tradicio en Gotenburgo!

Barbara ankaŭ trovis ekzemplon pri la gotenburga humuro: Leterkestoj por plendleteroj al la administraro estas dise metitaj en neatingeblajn lokojn i.a. meze en la kanalo antaŭ la administrejo.

Pri Dag Hammarskjöld kaj la pacpremio ŝi raportis. La memorojn pri malnovaj tempoj de Lenke Szász kaj Harriet Lindskog ŝi alte taksis.

Alia tre interesa memoro estas kiam Inga Johansson gastigis Marjorie Boulton kaj ekhavis skribon de ŝi en sia gastlibro.

Sten Johansson estas ja konata verkisto kaj Barbara menciis lian tradukon de rakonto pri "Hundo sen mastro" verkita de Hjalmar Söderberg.

Do, mi konstatas ke Barbara legis la tutan novembran numeron!

Ŝi aparte ŝatis la hajkojn, kiujn Andreas enmetis, kaj ŝi laŭlegis unu, kaj ankaŭ unu el tiuj poemoj de Dag Hammarskjöld, kiujn Andreas tradukis.

Jes, ja, post tiu favora raporto de la Pola Radio ni kun nova kuraĝo plulaboros pri Ora Ĵurnalo. /Siv


Eble konsolo en koronatempoj

Kanske en tröst i coronatider

Sylvia Browne (https://en.wikipedia.org/wiki/Sylvia_Browne) skribis en 1984 (traduko el la dana de la teksto en la bildo malsupre): Ĉirkaŭ 2020 grava malsano, iomete simila al pneŭmonito, disvastiĝos tra la mondo. Ĝi atakos la pulmojn kaj la bronkojn kaj rezistas al ĉiuj konataj kuracoj. Sed kio estas same nekompreneble kiel la malsano mem, estas ke ĝi malaperos same rapide kiel ĝi alvenis, sed ĝi volas ataki denove post 10 jaroj kaj poste tute malaperi.



En spåkone skrev dette i 1984, rammende 🙄
Dette er taget fra en bog: Dagens afslutning. Af Sylvia Brown.



El
Facebook

Sylvia Browne, naskiĝis en 1936 en Missouri kaj mortis en 2013. Ŝi skribis multajn librojn. Kelkaj estas tradukitaj en la svedan, ekz. *Livsredskap, Lär av dina tidigare liv, Besök från andra sidan kaj Mellan två världar.*

Alia antaŭdiro, kiu poste realiĝis, temas pri Titanic. Morgan Robertson skribis en 1898

novelon kun la nomo "The Wreck of Titan", do 14 jarojn antaŭ la pereado de Titanic. La Titan ankaŭ subakviĝis en la Nordatlantiko. La novelo do estis verkita kiam Titanic eĉ ne estis planita. Ambaŭ ŝipoj subakviĝis en aprilo kaj la savboatoj ne sufiĉis por la pasaĝeroj. Ankaŭ estas similecoj pri la mezuroj de la ŝipoj. /Siv

Kobolda ĥoro en korona distanco



Gunilla Jansson fotis.

La tago de la Infankonvencio, 20 novembro Barnkonventionens dag, 20 november



<https://unicef.se/barnkonventionen/las-texten#kort-version>

F.N.s Barnkonvention är från den 20e november 1989. De flesta länder har skrivit under den – dock inte USA.

År 2018 röstade riksdagen igenom att barnkonventionen skulle bli lag i Sverige, vilket den blev 1 januari 2020.

Barnkonventionen består av 54 artiklar. Följande fyra anses som de viktigaste:

Nr 2. Alla barn har samma rättigheter och lika värde.

La UN-Konvencio pri la Infanaj Rajtoj datiĝas de la 20a de novembro 1989. Plej multaj landoj subskribis ĝin – tamen ne Usono.

En 2018, la sveda parlamento voĉdonis ke la Konvencio pri la Rajtoj de la Infano fariĝos leĝo en Svedio. Tio estis la 1:an de januaro 2020.

La Konvencio pri la Rajtoj de la Infano konsistas el 54 artikoloj. La jenaj kvar estas konsiderataj la plej gravaj:

Nr 3. Barnens bästa ska beaktas vid alla beslut som rör barn.

Nr 6. Alla barn har rätt till liv och utveckling

Nr 12. Alla barn har rätt att uttrycka sin mening och få den respekterad.

Punkt nr 12 tog elever i Arboga fasta på konventionen, och fick fullmäktige att lyssna till deras förslag om en roligare skolgård.

(Ur Kamratposten nr 18, 2020)



N-ro 2. Ĉiuj infanoj havas la samajn rajtojn kaj egalan valoron.

N-ro 3. La plejbono por la infanoj devas esti konsiderata en ĉiuj decidoj pri infanoj.

N-ro 6. Ĉiuj infanoj havas la rajton je vivo kaj evoluo.

N-ro 12. Ĉiu infano rajtas esprimi sian opinion kaj havi ĝin konsiderata.

La artikolon n-ro 12 lernantoj en Arboga traktis serioze, kaj igis la komunuman konsilion aŭskulti ilian proponon pri pli amuza lerneja korto.

(El Kamratposten n-ro 18, 2020)



”La Nobel-premio ekzistas dank’ al ĉevaloj”



La foton mi faris proksime al mia hejmo en Gråbo. Kiel ofte estas skribite en gazetoj: ”la bildo ne havas ligan al la teksto”. Tamen, bildoj valoras.

Tiun strangan rubrikon mi legis en la gazeto ”Lokalpressen” en mia komunumo Lerum. La

ĵurnalisto KG Mattsson certigas, ke estis pro la ĉevaloj de Alfred Nobel en Karlskoga ke la Nobel-premio ekzistas.

Kiam oni malfermis la testamenton de Nobel, montriĝis ke li donacis la plejparton de sia kapitalo al aparta Nobelpremio. La parencoj, la reĝo, la gazetoj, la akademianoj – ĉiuj furiozis.

Alfred Nobel loĝis en pluraj landoj. Li aĉetis i.a. luksan loĝejon en Parizo, vilaon ĉe la strando en San Remo kaj la sinjordon Björkborn en Karlskoga. Sed emon de distraĵo li ne havis. Li estis priskribita kiel labora formiko. Sian tempon li pasigis en laborejoj kaj en konsidĉambroj.

La riĉaĵo baziĝis sur milita industrio. Estas vera imperio de entreprenoj en Eŭropo, Rusio kaj Usono. Li ankaŭ financis projektojn de aliaj, ekz. la slojdseminaron de August Salomon en Nääs, la polarekspedicion de

Andrée kaj la esplorajn vojaĝojn de Sven Hedin.


Ragnar Sohlman, dungito de Nobel, strebis por realigi la lastan deziron de sia estro. Li kolektis valorpaperojn el la tuta imperio de Nobel, batalinte kontraŭ juristoj kaj tribunaloj. Li sukcesis kunigi ilin al Karlskoga. En Parizo li gajnis super la tribunalo dirante: *”Kie viro havas siajn ĉevalojn, tie li havas sian hejmon”*. Tri rusaj ĉevaloj troviĝis en Karlskoga, do lia hejmlando estas Svedio.

Bertha von Suttner, la sekretario de Alfred Nobel, igis lin fondi la pacpremion dirante: – *Vi dum la tuta vivo laboris pri militaĵon, nun estas tempo labori por PACO!*

Sed – sen la ĉevaloj eble ne estus Svedio kiu disdonus la premiojn.

Tiutempe Svedio kaj Norvegio estis unu lando, kaj tial ankaŭ Oslo estas envolvita kiel donanto de la pacpremio. /Siv

Komunikiloj tiam kaj nun



Bildo de Pixabay



De Hans-Georg Kaiser (Humuro en Esperanto) ricevita de Fritz Cremer (Ŝercoj en Esperanto).

Lenke Szász memoras siajn infanaĝajn kristnaskojn en Rumanio

Kristnasko dum mia infanaĝo



KIAM MI ESTIS KNABINO, ĉiam mi atendis la "alvenon de la anĝelo". Mia naskiĝvilaĝo estas loĝata plejparte de sikulaj hungaroj, laŭ religio kalvinanoj.

Ĉe ni "alvenis anĝelo" vespere, la 24an de decembro. Mi tre atendis rian alvenon, kaj ofte demandis la patrino: Kiom mi devos dormi ankoraŭ ĝis tiu tago? (Kiom dormi – tio signifis: Kiom da tagoj restis ankoraŭ ĝis la alveno de la anĝelo?)

Kaj mi desegnis plurfoje kristnaskan arbon ornamitan kun "salonaj sukeroj". Tio estis bombonoj hejme kuiritaj de patrino el sukero kaj envolvitaj en blankaj paperoj kaj staniolo. Oni konservis la staniolan volvaĵon por la venonta kristnasko, ĉar tiutempe, en la 1950-aj jaroj estis malriĉeco kompare kun la nuntempo.

En la vilaĝo ne estis elektra kurento nek akvo enkondukita en domoj. Akvon ni portis endomen el la puto troviĝanta en korto.

Sed mi volis rakonti pri la tre atendita vespero de la 24-a de decembro. Tiutempe

vintro estis vintro, kun abunda neĝo. Patrino lasis min eliri al la proksima deklivo kun la sledeto. Kiam mi eniris post la vesperiĝo en la domon, en la ĉambro jam troviĝis la kristnaska arbo ornamita kun "salonaj sukeroj" (hungare: szaloncukor), kun la briletantaj ornamaĵoj kaj la brulantaj kandeloj.

Sub la arbo estis donacoj, kutime bezonataj kaj utilaj lanaj ŝtrumpetoj, lana kaptuko kaj io simila. Eĉ nun mi havas la rozkoloran lanan kaptukon, kiun antaŭ pli ol sesdek jaroj la "anĝelo" alportis al mi. La kara "anĝelo", mia patrino, jam delonge estas en la ĉielo... Plej multe min ĝojigis ne la vestaĵoj, sed la libro, kiam mi jam sciis legi. Eĉ nun mi havas la belegan fabellibron, kiun alportis "anĝelo de mia frato". Mi kredas, ke tiutempe tiu fabellibro ilustrita estis la plej bela trovebla en la rumaniaj librovendejoj. Mia frato aĉetis ĝin por mi en fora urbo, kie li militservis.

Ankaŭ mia frato jam estas inter la anĝeloj...

Mia patrino rakontis, kiel mi estis ravita de la kristnaska ornamita arbo. Elektro ne estis, lampon kun oleo oni ne uzis vespere tro longe, ja la oleo kostis. La familio enlitiĝis, sed tra la fenestro eniris iom da lumo el la ekstera lunlumo fortigita de la blanka neĝtavolo.

Mi diris ravita al mia patrino (kun ŝi mi dormis en la sama lito), kiel la bombonoj (en staniolaj envolvaĵoj) briletas. Ĝis la endormiĝo mi admiris ravita la miraklon, ja por mi okazis miraklo.

Kaj post kelkaj jaroj mi malŝatis aŭskulti la asertojn de samklasaninoj, ke anĝelo ne ekzistas, ke la gepatroj alportas la kristnaskan

arbon. Mi rifuzis kredi, ke estas nenia miraklo. Nun, kiam mi estas maljuna, mi komprenis, ke tia mi estis dum la tuta vivo – mi preferis esti ravita, mi preferis la magion, la iluzion, ol la nudan, malvarman scion. Tio validis ankaŭ por la amo, kiam mi estis juna. Mi preferis tiun animstaton, kiam mi vidis brilon en mallumo, kiam la tuta animo estis lumigita.

Aliaj infanoj tuj ĵetis sin sur la bombonoj kaj la donacoj, sed mi konservis en la tuta vivo tiun ravitecon de la animo, anstataŭ la konkretaĵoj...

/ Lenke

Jula rakonteto el la pasintaj tempoj en postmilita lando – en Finnlando

de Raita Pyhälä



IE IAM, antaŭ longe vivis knabineto, kiu nomiĝis Pirjo. Ŝia nomo devenis de Birgit, sed ŝi ne tion sciis, ŝi kaj ŝiaj samlingvanoj ne sciis prononci B kaj G. Malgraŭ tio Pirjo estis sufiĉe feliĉa.

Jam venis vintro kaj ŝi ĝuis la neĝon, precipe la skiadon. Sketilojn ŝi ne havis, sed ŝi ne malĝojis, ĉar ankaŭ la aliaj homoj en ŝia vilaĝo ne havis sketilojn.

Ŝiaj vestaĵoj ne estis novaj, kontraŭe. La vestaĵojn ŝi heredis de pli aĝa fratino aŭ de kuzinoj. Tamen nun estis escepto. Panjo kudrigis por ŝi belan robon. Tio malofte okazis, ĉar en tiu fora pasinta tempo estis malfacile aĉeti ŝtofon kaj pagi al la kudristino. Sed ne gravis, nun ŝi surhavis sian novan lanan robon, ĝi estis varma, blua, ŝatinda. La butonoj aspektis kiel brilaj amanitoj. Amuze!

Ŝi ofte fingrumis la butonojn kaj rerigardis ilin.

Sub la robo ŝi havis purajn ĉemizon kaj kalsoneton, surpiede dikajn kaj longajn ŝtrumpojn trikitajn el lano. Ili iom jukis ŝian haŭton ĉe la gamboj, sed ŝi alcutimiĝis. Ŝia longa densa hararo estis lavita, sekigita, brositita, kombita kaj kunigita en du dikaj brilaj plektaĵoj. Malofte la patrino lavis ŝian hararon, eble unu fojon en monato aŭ du monatoj. Estis ja malfacile lavi ĝin en la brulvarma saŭno sen duŝo, sen krano, la sapo bruldoloris en ŝiaj okuloj. Sed grave nun estis, ke la harplektaĵojn ornamis du grandaj ruĝaj bantoj ĉe la pinto. Ankaŭ la rubandoj estis lavitaj kaj gladitaj! Ŝi sentis sin vere pura kaj bela, esperplena.

Estis la 24a de decembro, la plej granda festo de la jaro. Kvankam ŝia patro ĉiujare diris, ke la infanoj ne havos donacojn, ŝi skribis leteron al Joulupukki, la fabela bonvola virego, kiu al ĉiu finna domo kaj bieno venis per sledo tirata de ĉevalo. En sia letero ŝi petis, ke Joulupukki donacu al ŝi fabellibron. Pirjo tre ŝatis fabelojn, sed ne la timigajn. Dankon al la familia kuracisto, Panjo sciis, ke Pirjo ne eltenas kruelajn legaĵojn kaj ke la fino neniam estu malfeliĉa.

Esperable ankaŭ Joulupukki sciis tion. La leteron Pirjo starigis en la neĝo inter la siringoheĝo kaj dika pino. Poŝtmarkojn ŝi ne havis, monon ŝi ne havis kaj ne sciis la precizan adreson. Tamen ŝi gaje kaj firme kredis, ke la julaj koboldoj forportos la leteron al la Orelmonto* en Laponio, kie Joulupukki tiam loĝis kun siaj edzino kaj koboldoj. Pirjo miris, ĉu li havas tiom da infanoj. La koboldoj ja ĉie embuskas kaj gvatas, ĉu ŝi bone kondukas, diris la plenkreskuloj.

La tempo pasas tro malrapide. En la tagĉambro patro starigis la piceon, kiun li estis preninta el sia propra picearo. Li iom

grumblis, ke ĝi ne plu kreskos por fariĝi mono-donan lignon.

Ne, ĝi estas starigita kiel festoarbo, la infanoj rajtas meti sur ĝin ornamaĵojn, kiujn ili mem faris, kaj la fragilajn vitrobirdojn de Panjo, kaj la aĉetitajn blankajn kandelojn. La piceo bonodoras kaj belegas.

Bonodoras ankaŭ la hiacinto, kiun iu amikino aĉetis por Panjo. Neniam antaŭe Pirjo vidis tian floron.

En la manĝoĉambro, kiun la familio uzis nur por Julio kaj la naskiĝtago de la patro, staras tablo kovrita de mirinda tuko brodita de Panjo. La manĝilaron kaj porcelanan servicon nun metitajn ili uzas nur dumfeste.

Ankaŭ la pladoj estas tiaj, ke tio haveblas nur dum la jula sezono. Dankon al la granda laboro de la gepatroj kaj la hejme buĉita porko: ŝinko, kolbasetoj, fiŝaĵoj, diversaj pladoj el karotoj, ruĝaj betoj, napo, terpomoj, kaj por deserto rizokaĉo kun cinamo kaj sukero, kompoto el sekigitaj prunoj kaj aliaj fruktoj. La freŝaj oranĝetoj en malnova ligna ujeĝo aspektas kiel someraj sunetoj en la vintra malhelo. Ili ankaŭ plaĉe bonodoras.

Post la frandinda manĝo aŭdiĝas bruego ĉe la pordo. Envenas Joulupukki. Li havas paketojn en la korbego, per kiu oni kutime portas lavitajn tukojn kaj vestojn. Lia vizaĝo aspektas ne homa, ĉar li surhavas maskon kun longa blanka barbo kaj okulvitroj, tra kiuj la okuloj blinkas. Li diras, ke li malbone vidas, kaj petas iun alian legi la nomojn sur la paketoj volvitaj en buntaj julpaperoj.



Surprize! Malgraŭ la antaŭdiro de Paĉjo ĉiu familiano ricevas 2–3 donacojn! Pirjo kun granda intereso sekvas la malfermadon: lanaj ŝtrumpetoj, lanaj trikitaj gantoj, rozkoloraj kotonaj subvestaĵoj, kalsono el lano, noktoĉemizoj...

Sed kie la FABELLIBRO petita de ŝi? El la volvaĵoj aperas nur skribiloj, farbokrajonoj, kajero... kaj denove pliaj vestaĵoj. SED KIE LA FABELOJ? Pirjo ektimetas, ke ĝi ne troviĝos en la korbego....

Joulupukki jam foriras dirante, ke li devas iri al siaj ĉevalo kaj sledo plena de donacoj por aliaj infanoj en la vilaĝo.... Paĉjo lin dankas etendante al li glaseton da brando.

Pirjo amare pensas, ke ankaŭ en aliaj hejmoj oni tiel regalis Joulupukki kaj ke li ebriiĝis kaj forgesis ŝian libron. Ŝi preskaŭ ploras. La kandeloj kaj fajreroj de ĝojo kaj espero estingiĝas en ŝiaj okuloj. Ŝi provas kaŝi sian vizaĝon per la basko de sia robo. Paĉjo kaj Joulupukki estas elirontaj, sed tion ŝi ne volas vidi. Joulupukki iom riproĉas la infanojn, ke ili ne kantis julajn kantojn por li. Strange ke li ne

scias, ke en tiu ĉi familio oni ne muzikas, ĉar la patro ne eltenas miskantadon. Ankaŭ li ne plu kantas, sed kelkfoje li ludas violonon, nur por si, sen aŭskultantoj, kiujn li petas eldomiĝi, kvankam la eta Pirjo tre ŝatus aŭskulti muzikon. Violono estas ŝia plej ŝatata instrumento.

Kiam Paĉjo revenas tra la pordo, li portas en siaj manoj ne malgrandan pakon. Li diras, ke li trovis ĝin en la neĝo apud la sledo de Joulupukki. Li serĉas la nomon sur ĝi, trovas kaj en klara voĉo legas: Bonan Julon al Pirjo, deziras Joulupukki! Ŝia espero revenas.

La ĝojofajreroj reaperas en ŝiaj okuloj. La kandeloj pli forte lumas. Paĉjo enmanigas al ŝi la pakaĵon kaj ŝi singarde malvolvas la buntan paperon, sen ŝiri. Oni ja ŝparas ĝin por la sekva julo. Malrapide eliĝas dika libro, ĝuste tiu fabellibro, kiun ŝi deziris kaj atendis. Grandan dankon al Joulupukki!

"Saliko"

*Orelmonto, finne Korvatunturi, situas en orienta Laponio. Nuntempe Joulupukki loĝas rande de la urbo Rovaniemi. Li pli kaj pli imitas Santa Klaŭson.



Ĉi tiu poŝtkarto estas farita de Ilkka Kylmäkoski, kaj ĝi bone spegulas la etoson de la tempo de Joulupukki, sed ruĝan vestaĵon li ne portis.

Vintra kanto

(Dana kanto)

Melodio: J.P.E. Hartmann

Teksto: B.S. Ingemann

Traduko: H.P. Frodelund

1. En neĝo staras ĉiu heĝ',
malvarmo estas estro,
kaj tamen kantas en la neĝ',
birdeto ĉe fenestro.

2. Atentu ĝoje kantas ĝi
el sia eta koro,
kaj kreskos sur la branĉ' foli'
burgonos ĉiu floro.

3. Eĉ se la frosto regas nun,
la vivo-arbo verdos,
kaj kion songis vi pri sun'
en vero vi ekspertos.

4. La vintra domo de la kor'
forkuros pro somero.
Atendu, kaj Sinjora hor'
jam estos en apero.



Bildo de Pixabay

I sne står urt og busk i skjul J. P. E. Hartmann, 1866

I sne står urt og busk i skjul; det er så koldt der - u - de; dog
sym - ger der en lil - le fugl på kvist ved fros - ne ru - de.

≡ Dana Kristnaska kanto ≡

Esperanta teksto: P. Th. Jutesten

Originala teksto N.F.S. Grundtvig

http://kantaro.ikso.net/kristnaska_kanto

Naskiĝis Li en Betlehem. –
Betlehem.

Ĝojegas nun Jerusalema.
Halleluja! Halleluja!

Knabin' malriĉa dum malhel' –
dum malhel'
ja naskis princon de l' ĉiel'.
Halleluja! Halleluja!

En furaĝujo kuŝis Li –
kuŝis Li.
Jubilis birdokant' pri ĝi.
Halleluja! Halleluja!

Oferis nokte reĝoj tri –
reĝoj tri
trezorojn egajn tuj al Li.
Halleluja! Halleluja!

Foriris nia mondmezur' –
mondmezur'.
Saviĝis ĉiuj ni sur ter'.
Halleluja! Halleluja!

Infan' fariĝis ni de Di' –
ni de Di'.
Kristnasko pretas nun ĉe Li.
Halleluja! Halleluja!

Sur steltapiŝo blua plej –
blua plej –
ni iros al ĉielpreĝej'.
Halleluja! Halleluja!

Ni kantos tie laŭ instru' –
laŭ instru' –
pri Li, la infanet' Jezu'.
Halleluja! Halleluja!

Al Li laŭdkantu ĉiuj vi! –
ĉiuj vi!
Savonton, fraton havas ni.
Halleluja! Halleluja!

Et barn er født i Bethlehem,
Bethlehem,
thi glæder sig Jerusalem.
Halleluja, halleluja!

En fattig jomfru sad i løn,
sad i løn,
og fødte himlens kongesøn.
Halleluja, halleluja!

Han lagdes i et krybberum,
krybberum,
Guds engle sang med fryd derom.
Halleluja, halleluja!

Og østens vise ofred der,
ofred der,
Guld, røgelse og myrra skær.
Halleluja, halleluja!

Forvunden er nu al vor nød,
al vor nød,
os er i dag en frelser fød.
Halleluja halleluja!

Guds kære børn vi blev påny,
blev påny,
skal holde jul i himmelby.
Halleluja, halleluja!

På stjermetæpper lyse blå,
lyseblå,
skal glade vi til kirke gå.
Halleluja halleluja!

Guds engle der os lære brat,
lære brat,
at synge, som de sang i nat.
Halleluja, halleluja!

Ham være pris til evig tid,
evig tid,
for frelser bold og broder blid!
Halleluja, halleluja!

La hundo Linus

de Christin Granat

Linus estas ŝafhundo kun hela felo. Ĝin antaŭe posedis mia iama taksiaŝoforo Mats. Nia familio pruntis ĝin dum unu semajno, antaŭ ol ĝi fariĝis nia hundo.

Vintran matenon mia fratino Anneli kaj mi glitveturis, tirataj de Linus.

Estas amuze, Anneli kaj mi pensis. Linus ankaŭ pensis ke estas amuze kuri sur vintro-blanka herbejo.

Mi memoras, ke mi falis de la glitveturilo unu fojon. Sed iris bone. Sed poste Linus fariĝis laca kaj kuŝiĝis por ripozi sur la sofo.

Jen bildo de Linus:

Sur la suba bildo: maldekstre Mats, dekstre mia patro.



Buteo

de Ingegerd

buteo buteo svede: ormråk

La buteo estas granda, bela birdo, kiu ofte troviĝas ĉirkaŭ Gotenburgo.

La birdo estas 51–60 centimetrojn longa kaj pezas 600–1300 gramojn. La aspekto estas ofte brunmalhela kun pli helaj brustaj bendoj. Ĝi ofte sidas alte en arboj vidante ĉu ĝi povas ataki iun muson. Ĝi glisadas per relative ebenaj flugiloj.

Sur ĝia menuo estas etaj birdoj, etaj ronguloj kaj reptilioj. Ĝi vivas en arbo havante 2–4 idojn dum la tempo de kovado. La sono laŭ la libro estas, piieehh, sed mi dubas! Fakte ĝi sonas kiuuu, kiuuu, kaj mi nomas lin **”La Esperanta birdo!”**.

En mia arbaro!



La buteo diras:

Mi estas la esperanta birdo kaj mi sidas alte en piceo ĉe ”Enerkulldalen” kiu estas bona ejo por mi! Troviĝas profundaj valoj kun multaj kaptaĵoj kiel musoj, birdoj kaj serpentoj. Mi neniam povas esti malsata. Kiam estas bona vetero mi flugas alte super la valoj. Mi velas sur la ventoj, estas vere rava travivaĵo. Sed, mi estas sola...

Mi vokas ”kiuu, kiuu” sed neniu venas, mi estas sola... Eble neniu komprenas mian

dialekton? Mi aŭdis ornitologojn, kiuj diris ke mia voko estis ”piieehh” sed kiam mi vokis ”piieehh” mi estis malsana... supozeble mi manĝis putran raton, mi ne scias!

Sed, mi estas sola alte en piceo! Mi volas havi amikojn! Mi estas esperantisto kaj mi ne volas senti min sola...

”Sola”:

https://www.youtube.com/watch?v=oz5mZ9_k_I




- Kiu estas?
- Ĉu vi ankaŭ parolas esperanton?
- Jes certe, kiu vi estas?
- Mi estas esperanta birdo buteo.
- Mi ankaŭ!
- Ĉu neniu volas partopreni en la arbara, fluganta esperantoklubo?
- Jes, kiu ne volus?
- Venu kun mi, vi faris multajn paroladojn!
- Ni flugu por kapti lunĉon!
- Ni flugos!
- Ĝis revido!

Ĉiuj bildoj, supre kaj sube, venas el albumo de natura fotografistino Renate Säfström.



hjälper barn
i världen

www.fotoforlivet.com



Unu el la Svedaj historiaj stiloj

La Rokoka stilo

La Rokoka stilo faris sian helan enmarŝon en Svedion en la jaro 1730. Estis Carl Hårleman, kiu havis la respondecon por la palaca domkonstruado post la granda brulo de "Tre Kronor". Li dungis francajn artistojn kaj li ankaŭ aĉetis francajn specimenojn de tekstila

kaj ligna artoj. Svedaj artistoj kaj meblistoj ekhavis multajn laborojn. La rokoka stilo kun molaj ludemaj trajtoj, graciaj formoj, belaj mebloj kun kurbaj piedoj, remburitaj sidkusenoj kaj dorsapogiloj.

En 1754, kiam la reĝa familio translokiĝis en la palacon la rokoka stilo okupis la tutan Svedion. Rokoko estas la plej bela stilo laŭ mia opinio! /Ingegerd

Galerio de rokokaj mebloj



Bonvenon trinku kafon en la rokoka tempo!



Sidu en la komforta "Emma"-seĝo kaj klinu vin malantaŭen!

Imagu vin reen kaj aŭskultu la susuron de la vastaj puntaj jupoj kaj sentu la polvon de la pudritaj perukoj!



Lumigu la kandelabrojn, kiuj staras sur la skribotablo!



Eltiru la suban maldekstran kaston en la skribotablo. Tie troviĝas letero de la "Suna" reĝo en Francio.



Invitu tri amikojn de "la tempo" por sidi en la sofo aŭskultantaj vin, kiam vi legas laŭte el la letero.



La plej bela kafoservico staras sur la eta tablo.



Kiam la kafopaŭzo estas finita kaj la letero estas legita, la amikoj forlasas la rokokan ejon, kaj vi fermas la komodon.



Hanna Lindmark, la fondinto de la Margareta-lernejo

Hanna Lindmark, grundare av Margaretaskolan



Hanna Lindmark (1860–1941) var en betydande kvinna i Göteborgs historia. Hon startade hushållsskolor, de s.k. Margaretaskolorna, i flera svenska städer.

1923 köpte hon det Dicksonska Palatset i Göteborg. Där startade hon sin åttonde Margaretaskola och drev där en mycket uppskattad restaurangrörelse. Hon hade fem festvåningar i palatset.

Det var fint att gå på kurs på Margaretaskolan. Varje kurs varade i två till tre månader.

Maten, som serverades var billig.

Hushållsskolan upphörde i mitten av 40-talet, efter svårigheter med ransoneringarna under krigsåren, men restaurangdelen fortsatte.

Mer om Sara Johanna (Hanna) Lindmark från www.skbl.se/sv/artikel/HannaLindmark, *Svenskt kvinnobiografiskt lexikon av Ewonne Winblad, hämtad 2020–11–12.*

Hanna föddes i en torparfamilj i Arenäs utanför Örnsköldsvik. Då hennes mor dog i barnsäng, såldes Hanna på "fattig-auktion". En gång om året var det en ny auktionering till



Hanna Lindmark (1860–1941) estis elstara virino en la historio de Gotenburgo. Ŝi startis mastrumadajn lernejojn, la t.n. Margareta-lernejojn, en pluraj svedaj urboj.

En 1923 ŝi aĉetis la "Dickson-palaco" en Gotenburgo. Tie ŝi fondis sian okan Margareta-lernejon, ŝatatan restoracian entreprenon. Ŝi havis kvin bankedajn salonojn en la palaco.

Estis distingite frekventi kurson ĉe la Margareta-lernejo. Ĉiu kurso daŭris du-tri monatojn.

La servita manĝo estis malmultekosta. La mastrumada lernejo ĉesis meze de la 1940-aj jaroj, pro malfacilaĵoj pri la porciumado dum la militaj jaroj, sed la restoracia sekcio daŭris.

Pli pri Sara Johanna (Hanna) Lindmark

www.skbl.se/sv/artikel/HannaLindmark, *Svenskt kvinnobiografiskt lexikon de Ewonne Winblad, prenita 2020–11–12.*

Hanna estis naskita en farmetista familio en Arenäs ekster Örnsköldsvik. Kiam ŝia patrino mortis dum akuŝo, Hanna estis vendita ĉe "aŭkcio pri malriĉuloj". Unufoje jare estis nova aŭkcio por diversaj vartgepatroj, ĝis ŝi fariĝis 15-jaraĝa kaj povis servi kiel servistino. Unu el ŝiaj vartistinoj instruis ŝin legi kaj skribi, ĉar neniam okazis regula lernado.

Hanna ŝparis monon por fariĝi misiisto. Ŝi komencis ĉe "Bibelkvinnohem" (Biblia virina hejmo) de Elsa Borg en Stokholmo, sed post unu jaro la mono estis je la fino. Ŝi tiam

olika fosterföräldrar tills hon fyllde 15 år och kunde tjänstgöra som piga. En av hennes fostermammor lärde henne att läsa och skriva, för det blev aldrig någon regelbunden skolgång.

Hanna sparade pengar för att kunna utbilda sig till missionär. Hon började på Elsa Borgs Bibelkvinnohem i Stockholm, men efter ett år var pengarna slut. Hon bestämde sig då för att satsa på något hon redan kunde – laga mat.

År 1899 anställdes Hanna som hushållerska på KFUM (Kristliga föreningen av unga män) i Östersund.

Snart övertog hon matserveringen.

Nu hade Hanna sin affärsidé klar.

- 1) Hon skulle lära unga, kristna flickor att laga svensk husmanskost
- 2) Maten skulle säljas dagsfärsk i butik. Hon blev alltså först med "take-away" i Sverige.
- 3) Hon skulle starta en restaurang, där helnyktra gäster skulle äta utan att riskera att träffa berusade medgäster.
- 4) Hon skulle erbjuda en festvåning, där människor kunde hålla kalas och fester med mat och service.

En av de första gästerna var Axel Lindmark. Han var nybliven änkeman och hade flyttat till Östersund med sina tre barn. Mycket snart uppstod tycke mellan Axel och Hanna. De gifte sig 1904 och Axel blev Hannas livslånga kompanjon. Han skulle komma att sköta hennes bokföring och administration i det som blev Margaretaskolan.

Steg för steg etablerade Hanna sig i stad efter stad och Margaretaskolan blev en landsomfattande kedja med butiker, restauranger och festvåningar i Stockholm Göteborg, Malmö, Norrköping, Linköping, Borås, Jönköping, Västerås, Örebro, Lund, Helsingborg och Tranås. I varje stad fanns också en hushållsskola för unga kristna flickor. Varje föreståndare ansvarade för både undervisning och restaurangrörelse.

decidis investi en io, kion ŝi jam sciis –
kuirado.

En 1899, Hanna estis dungita kiel mastrumisto ĉe YMCA (Kristana Asocio de Junaj Viroj) en Östersund.

Baldaŭ ŝi transprenis la manĝservon.

Nun Hanna havis sian komercan ideon preta.

1) Ŝi instruu al junaj kristanaj knabinoj kiel kuiri svedan neluksan kuiradon.

2) La manĝaĵoj vendiĝu freŝaj ĉiutage en la butiko.

Ŝi tiel estis la unua kun "forportebraj manĝaĵoj" en Svedio.

3) Ŝi startu restoracion, kie sobraj gastoj povus manĝi sen riski renkonti ebriajn kungastojn.

4) Ŝi ofertu festan etaĝon, kie homoj povus okazigi festojn kaj bankedojn kun manĝo kaj servo.

Unu el la unuaj gastoj estis Axel Lindmark. Li fariĝis antaŭ nelonge vidvo kaj jam translokiĝis al Östersund kun siaj tri infanoj. Tre baldaŭ ŝato ekestis inter Axel kaj Hanna. Ili geedziĝis en 1904 kaj Axel iĝis la dumviva partnero de Hanna. Li zorgos pri ŝia kontado kaj administrado en tio, kio fariĝis la Margareta-lernejo.

Paŝon post paŝo Hanna starigis entreprenojn, urbon post urbo kaj la Margareta-lernejo fariĝis tutlanda ĉeno kun butikoj, restoracioj kaj bankedoj en Stokholmo, Gotenburgo, Malmö, Norrköping, Linköping, Borås, Jönköping, Västerås, Örebro, Lund, Helsingborg kaj Tranås.

En ĉiu urbo estis ankaŭ mastrumada lernejo por junaj kristanaj knabinoj. Ĉiu estrino respondecis kaj pri instruado kaj pri restoracio.

Ĉar la komerco kreskis, Hanna investis en nmoveblaĵoj. Ŝi aĉetis ekz. Palacon Dickson en Gotenburgo en 1923.

Hanna kaj Axel Lindmark ĉirkaŭiris kaj inspektis ĉiun lernejon. Axel kontrolis la kontojn kaj Hanna inspektis la kuirejon kaj

I takt med att rörelsen växte investerade Hanna i fast egendom. Hon köpte t.ex. Dicksonska palatset i Göteborg år 1923.

Hanna och Axel Lindmark åkte runt och inspekterade varje skola. Axel granskade bokföringen och Hanna inspekterade kök, hygien och provsmakade maten. Undervisningen fick nya element, som t.ex. näringslära.

Varje år gav makarna 10 % av vinsten till fyra olika missionssällskap. Det var Hannas sätt att gynna missionen, då hon inte själv kunde bli missionär.

År 1927 tilldelades Hanna Lindmark regeringens förtjänstmedalj *Illis quorum* "för sina förtjänster som lärarinna" – en triumf för henne, som själv aldrig gått i skolan.

Efter makens död drev Hanna Margaretaskolan vidare till 1941, då hon avled i lunginflammation. Hon testamenterade Margaretaskolan och alla sina egendomar till fyra missionssällskap. Hon lämnade sina tidigare planer om att låta varje skolas föreståndarinna ärva. Detta visade sig ödesdigert. Margaretaskolan gick i konkurs och upphörde 1977, sedan företagats tillgångar förskingrats av en av de verkställande direktörer, som fått ansvaret efter Hanna Lindmarks död.

/Siv



Dicksonska palatset

higienon, kaj gustumis la manĝaĵojn. La instruado ricevis novajn elementojn, ekzemple nutradsciencon.

Ĉiujare, la geedzoj donis 10% de la profito al kvar diversaj misiaj societoj. Tio estis la maniero de Hanna favori la mision, ĉar ŝi mem ne povis fariĝi misiistino.

En 1927, Hanna Lindmark ricevis la meritan medalon *Illis quorum* de la registaro "pro siaj meritoj kiel instruisto" – triumfo por ŝi, kiu mem neniam iris al lernejo.

Post la morto de sia edzo, Hanna administris la Margareta-lernejon ĝis 1941, kiam ŝi mortis pro pulminflamo. Ŝi testamentis la Margareta-lernejon kaj ĉiujn siajn posedaĵojn al kvar misiaj societoj. Ŝi forlasis siajn antaŭajn planojn heredigi ĉiun lernejan estrinon. Tio montriĝis fatala. La Margareta-lernejo bankrotis kaj ĉesis en 1977, post kiam la havaĵoj de la kompanio estis defraŭditaj de unu el la administraj direktoroj, kiu ricevis la respondecon post la morto de Hanna Lindmark. /Siv



Vin till julbord och julmat av Ingrid Vallin

Vino ĉe la kristnaska tablo kun jula manĝo de Ingrid Vallin

Öl fungerar bra till nästan allt, men vill man bjuda på ett par viner, som fungerar till det mesta på julbordet rekommenderas följande:

Biero funkcias bone kun preskaŭ ĉio, sed se vi volas regali per kelkaj vinoj, kiuj konvenas al la plej multaj pladoj sur la kristnaska tablo, oni rekomendas la jenon:

Tre vita viner / Tri blankaj vinoj:

1.



2.



3.



1. Jean Biecher, Pinot Gris Réserve 2019

99:– 12,5% Alsace, Frankrike (No 81401).
Ekologiskt vitt, fruktigt och smakrikt vin med bra ryggrad, fin liten drusötma och inslag av päron och örter.
Bra allroundvin till vegetariskt, olika sorters lax, skinka, revbensspjäll och hårda ostar.

2. Cave de Turckheim, Pinot Gris Réserve 2019

99:– 13,5%. Alsac, Frankrike Nr 2119.
Druvig smak med inslag av persika, kryddor, honung, melon och mandarin.
Passar till fisk (sill m.m.), grönsaker.

3. Gustave Lorentz, Gewurztraminer, Réserve 2019

109:– 14,5% – Alsace, Frankrike (Nr. 5244).
Torrt, men druvigt vitt vin med doft och smak av rosor, kryddor och päron.
Passar bra till rökta och smakrika kryddiga rätter och tillagade ostar.

1. Jean Biecher, Pinot Gris Réserve 2019

99:– 12,5% Alzaco, Francio (No 81401).
Organika blanka frukta kaj bongustega vino, kun bona "spino", iom da delikata vinberodolĉeco kaj nuancoj de piroj kaj herboj.
Bona multflanka vino por vegetaraĵoj, diversaj specoj de salmo, ŝinko, ripoj kaj malmolaj fromaĝoj.

2. Cave de Turckheim, Pinot Gris Réserve 2019

99:– 13,5%. Alzaco, France n-ro 2119.
Vinbero-gusto kun nuancoj de persiko, spicoj, mielo, melono kaj mandarino.
Taŭga por fiŝoj (haringoj, ktp), legomoj.

3. Gustave Lorentz, Gewurztraminer, Réserve 2019

109:– 14,5% – Alzacio, Francio (n-ro 5244).
Seka, sed vinbera blanka vino kun aromo kaj gusto de rozoj, spicoj kaj piroj.
Taŭga por fumaĵitaj kaj bongustaj spicaj pladoj kaj preparitaj fromaĝoj.

Om du inte har provat matjesill med brynt smör, så gör det!

Se vi ne provis haringon kun brunigita butero, do faru tion!

Tre röda viner / Tri ruĝaj vinoj:

1.



2.



3.



1. Château à Mont-Redon, Côtes du Rhône Réserve 2016 (nr 5461)

119:–

Mjukt, fruktigt, kryddigt och örtigt rödvin med toner av hallon, björnbär, svartpeppar, och rosmarin.

Passar bra till köttbullar, revbensspjäll, korv och kålrötter.

2. Heritage de Conseiller Pinot Noir Bouchard Aimé D Fils, Frankrike 2018

89:– (Nr 82531)

Bärig, något kryddig smak med fatkaraktär inslag av jordgubbar, hallon, färska örter, lingon och kanel.

Passar bra på julbordet: lättare fläskkött och lammkött.

3. Georges Duboeuf, Beaujolais Villages 2018 Morgon, Frankrike

89:– 13 %

Ungdomlig, bärig smak med inslag av skogshallon och örter.

Passar till stekt fisk, lättare småvarmt, skinka, grönsaksrätter / sylrig rödkålssallad eller brysselkål.

1. Château à Mont-Redon, Côtes du Rhône Réserve 2016 (n-ro 5461)

119:–

Mola, frukta, spica kaj herba ruĝa vino kun nuancoj de framboj, rubusoj, nigra pipro kaj rosmareno.

Taŭgas bone kun viandbuloj, ripoj, kolbasoj kaj napoj.

2. Heritage de Conseiller Pinot Noir Bouchard Aimé D Fils, Frankrike 2018

89:– (n-ro 82531)

Bera, iomete spica gusto kun barela karaktero, nuancoj de fragoj, framboj, freŝaj herboj, vakcinioj kaj cinamo.

Taŭgas bone sur la kristnaska tablo: pli malpeza porkaĵo kaj ŝafidaĵo.

3. Georges Duboeuf, Beaujolais Villages 2018 Morgon, Francio

89:– 13%

Juneca, bereca gusto kun nuancoj de framboj kaj herboj.

Taŭga por frititaj fiŝoj, iomete varmaj pladoj, ŝinko, legomaj pladoj / acida ruĝa brasika salato aŭ bruselbrasikoj.

